

Andreas Künzli (Svislando)

La angla lingvo kaj Svislando¹

Ĉu la angla lingvo estas bona aŭ malbona por Svislando ? Ĉi tiu diskuto pri la angla lingvo kiel eventuala ‚lingua franca’ en la kvarlingva Svislando estas kontraŭdira kaj ĝis nun okupas la mensojn de la homoj. Pri kio temas ?

Plurlingveco aŭ kvarlingveco estas konsiderata de la plej multaj aŭtoroj, kiuj okupiĝas pri la lingva situacio en Svislando, kiel centra elemento de la svisa nacia identeco. Sekve, la demando de la fremdlingva instruado estas en Svislando ne nur pedagogie, sed ankaŭ ŝtatpolitike esenca demando. Decidoj lige kun la fremdlingva instruado do esence dependas de tio, kiel oni penas lingvopolitikajn, ekonomiajn, lingvistikajn kaj pedagogiajn argumentojn. Ĉar la globala-interdependa ekonomio postulas bonajn konojn de la angla lingvo, la lernejo estas devigata generi tiajn konojn, kiel oni povas legi en ĉi-koncernaj fakaj raportoj kaj oficialaj kontribuoj pri la temo.

Ĉu la angla versus naciaj lingvoj ?

La sinteno pri la angla lingvo estas senpere ligita kun la sinteno pri la svisaj naciaj lingvoj. La svisa konstitucio (art. 70) garantias la respekton de lingvaj minoritatoj kaj postulas la konservadon kaj flegadon de la kvar svisaj lingvokulturoj. Pro tio la publika disputo inter diversaj flankoj daŭras jam plurajn jarojn. Ĉu la angla lingvo kiel ne-svisa lingvo estu (frue) instruata kiel deviga lernfako en la plano de la primaraj kaj sekundaraj lernejoj ? Kiu decidu pri tio ? (en Svislando demandojn pri aferoj de la publika edukado estas deciditaj de la kantonoj). Por kies interesoj oni agas, se oni decidus enkonduki la anglan lingvon – ĉu por la interesoj de la industrio kaj de la ‚globala’ ekonomio, ĉu de la gepatroj (kiuj estas konvinkitaj, ke iliaj infanoj lernu la anglan), de la infanoj mem (kiuj kredas, ke ĝi taŭgos por la profesia kariero ktp.), de la lando (en kiu oni opinias, ke la angla utilas kiel internacia komunikilo), de unuopaj kantonoj kiel strategiaj poziciaj lokoj de transnaciaj entreprenoj, ktp. ? Aliflanke, ĉu la preferado de la angla lingvo kiel dua lingvo post la nacia aŭ gepatra lingvo (germana, franca, itala, ktp.) endanĝerigus la t.n. koheron² de Svislando kiel plurlingva kaj multkultura lando kaj ties lingva(j)n kulturo(j)n, la lingvan ekumenon ? Ĉu germanlingva Svislando povus esti tentata perfidi la romandan (francilingvan, itallingvan kaj retoromanĉan) Svislandon ? Ĉu en lingvistika rilato la angla lingvo ne ‚degenerus’ kiel loka dialekto (‚Swiss English’ - analoge ekzemple al la hindia angla aŭ singapura angla) aŭ kiel ‚ĵargono’ laŭ diversaj fakterminolgioj por ne plu esti komprenebla por neuzantoj de tiuj fakoj ? Jen kelkaj demandoj, kiuj estis starigitaj en la diskuto pri la enkonduko de la angla lingvo kiel deviga fako en la frua stadio de la lernejo, kaj da ili ekzistas ankoraŭ pliaj.

Ĉu ekonomio versus politiko ?

¹ Ĉi tiu artikolo estas esperantlingva resumo de la originala artikolo en la germana lingvo, kiu aperis unuafoje en Interlinguistica Tartuensis (Tartu), n-ro VII/2005, kaj kiu estas alirebla sur: <http://www.planlingvoj.ch/files/ENGLISCHINDERSCHWEIZ.pdf>

La artikolo estas aktualigita per kelkaj novaj indikoj kaj la konsideroj de Regine Aeppli.

² Kohero en la senco de la nacia komuneco, nacia kunligiteco, komuna nacia sento aŭ nacia solidareco.

La demando pri la enkonduko de la angla lingvo kiel deviga lernofako kaj la preferado de la angla lingvo kompare kun la franca, germana aŭ itala lingvoj – pri la retoromanĉa (kies ekzisto estas en danĝero) ni tute ne parolu – fariĝis do jam delonge arda diskuttemo kun politika signifo. La kontraŭdira kaj tre emocie gvidata debato ne nur incitas la mensojn de la homoj, sed riskas eĉ profundigi la abismon inter la diversaj landopartoj – argumento servanta kiel municio por la kontraŭuloj de la angla lingvo kaj de la globaligita neoliberalisma ekonomio (ŝajnas ke ambaŭ estas intime ligitaj). Ekde la okdekaj jaroj aperadis sufiĉe da okazoj por inciti tiun kontraŭdiran debaton pri la fortigenda rolo de la angla lingvo en la svisaj lernejoj. Ekzemple en 1989 en raporto de la svisa registaro pri la stato kaj estonteco de la kvarlingva Svislando la angla lingvo estis taksita kiel granda danĝero por la harmonia kunvivado de la kvar svisaj naciaj kulturoj kaj kiel potenciala danĝero por la lingva paco. En tio oni do tuj vidas, ke rilate la gravecon aŭ indecon de la angla lingvo ekzistas kontraŭdiro inter la argumentado de la ŝtato (aŭ politiko), por kiu gravas la konservado de la naciaj kulturoj, kaj de la (privata) ekonomio, kiu postulas internaciajn opciojn. Ekde la mezo de la naŭdekaj jaroj la diskuto ricevis novan dimension, kiam en 1998 grupo de ekspertoj de la Svisa Konferenco de la edukdirektoroj prezentis proponojn por fari la fremdlingvan instruadon pli efika kun la konsidero meti la anglan lingvon sur statuse pli alta nivelo. Post la ekscitita debato enmiksiĝis lingvistoj, kiuj volis okupiĝi pri la problemo. Tiucele en la jaro 2000 en la berna universitato estis organizita pritema simpozio (la prelegoj estis publikigitaj). Samjare aperis detala scienca kaj oficiala esplorraporto pri la situacio de la angla lingvo en Svislando, kiu estis verkita de lingvistoj kaj anglistoj.

Zuriko kiel protagonisto

Por la angla lingvo, kiu estu enkondukita en la frua stadio de la lernejo, aperis la germanlingva nocio ‚Frühenglisch‘ (frua angla). En la strebado enkonduki la anglan lingvon en fruaj lernejoj, precipe la kantono Zuriko teorie kaj praktike ludas la gvidan rolon.³ La zurikaj kantono kaj grandregiono kun pli ol unu miliono da loĝantoj kaj centmiloj da laborfortoj estas la ekonomie plej potenca kantono de Svislando kaj pro tiu ekonomia graveco sekve ankaŭ internacie tre forte enplektita. Do, la angla lingvo aŭtomate altrudiĝas.

La historio de la zurika ‚anglalingva‘ eksperimento komenciĝis en 1996. En tiu tempo en la zurika kantono la angla lingvo ankoraŭ ne estis deviga en la popolaj kaj mezaj lernejoj, dum iuj aliaj kantonoj fakte jam enkondukis ĝin pli frue. Ĉi tiu stato estis konsiderata de multaj homoj en la zurika kantono kiel miriga, embarasa, malmoderna, neakceptinda. Sur tiu fono sekvis en aŭgusto 1996 la instrukcio al la kantona edukdirekcio prepari la enkondukon de la deviga anglalingva instruado en la popolernejoj kaj en la gimnazioj kun la celo enkonduki ĝin plej frue en la periodo

³ Laŭ lingvoj la loĝantaro de la zurika kantono konsistas el 83,4% germanlingvanoj. Nur 1,4% parolas la francan kaj 4,0% la italan, dum 11% ne parolas unu el la naciaj lingvoj de Svislando. La ĉi-lastan valoron superas nur la kantonoj Zug, Basel-Urbo kaj Ĝenevo. Ĉi tiuj ciferoj estas la ĉefa kialo kial en Zuriko la sentemo pri aliaj svisaj naciaj lingvoj ne estas tre forta. Despli se en la internacia labormondo la komunikado okazas en la angla lingvo. Aliflanke oni tre klopodas en Zuriko por la integrado de infanoj de eksterlandanoj vivantaj surloke. Pro tio la prioritatigo de la germana lingvo en Zuriko estas evidenta.

1999/2000. Post iu konferenco en Usono ekfunkciis laborgrupo kadre de la ‚Lerneja Projekto 21‘ (por la primara, do baza aŭ elementa lernejo), kaj, sekve al la rezultoj de la PISA-studoj,⁴ en decembro 2000 la zurika registaro akceptis ‚Gvidliniojn por zurika lingvopolitiko‘. Ĉi tiu laborgrupo ekzamenis la opcion enkonduki la anglan lingvon jam en la unua klaso de la primara lernejo. Lige kun tio estis realigita konkreta eksperimento en kiu oni konkludis principe pozitivajn spertojn. Sekvis diskuto pri la demando ekde kiu klaso tiu ‚frua angla‘ estu efektive enkondukita kaj kiujn metodojn oni apliku, ĉar oni ne volis ripeti la erarojn de la tradicia lingvoinstruado, kiu ĉefe celis plenkreskulojn kaj ne estis adaptita al la instruado al infanoj. Kiel rezulto la registaro de la zurika kanton decidis, ke la angla lingvo estu enkondukita en la popollernejoj en la periodo 2003/04 ekde la tria lernojar, dum la franca lingvo estu instruata nur ekde la kvina lernojar (por la relative malfrua instruado de la franca lingvo oni trovis sufiĉe da pravigaj argumentoj). Gravan rolon ludis en tiu debato ankaŭ fiziologiaj konsideroj (evoluo de la homa cerbo ktp.). Aliaj kantonoj ekintencis sekvi la zurikan modelon aŭ jam realigis la enkondukon de la angla lingvo en fruaj jaroj de la lernejo (vd. sube pri HarmoS).

La angla lingvo rapide progresas

Ĉu oni ŝatas tion aŭ ne, la angla lingvo galope disvastiĝas pli kaj pli ne nur en la lernejoj, ne nur en la industrio kaj ekonomio de Svislando – multaj transnaciaj entreprenoj utiligas preskaŭ nur la anglan lingvon (precipe post ilia kuniĝo kun aliaj entreprenoj por fariĝi internacia konzerno). Pensiga observo estas, ke en la ekonomia vivo la alteco de la salajro de dungito povas esti influita de la konoj de la angla lingvo. La angla lingvo disvastiĝas ankaŭ ĉiam pli kaj pli forte sur ĉiuj niveloj de la svisa universitata sistemo. En ambaŭ universitatoj de Zuriko la angla estas vaste uzata kiel lingvo de la scienco. En la berna universitato instruas anglalingvaj profesoroj en fakoj kiel psikologio, etnologio, matematiko, informatiko, mikrobiologio, popolekonomio, sed ankaŭ en politologio, sociologio, geografio kaj historio. En multaj fakoj la studentoj ĉiukaze devas legi anglalingvan fakliteraturon, kompreni anglalingvajn gastprelegantojn kaj partopreni diskutojn en la angla lingvo. Pli kaj pli ofte ili devas skribi siajn diplomverkaĵojn en la angla, ekzemple en bio- kaj natursciencoj. En enketo studentoj konfirmis, ke kompreni ĉion tion ne estus tro granda problemo, sed ili konfesis malfacilojn verki kaj paroli en la angla lingvo. Iuj eĉ esprimis la timon, ke la kreskanta potenco de la angla lingvo en la akademia ĉiutago povus konduki al la elitiĝo de la universitatoj, kio povus distancigi ilin pli kaj pli de la cetera socio.

Klare estas, ke sen adekvataj konoj de la angla lingvo, kiujn disponas mondvaste 300-400 gepatrolingvanoj, estas malfacile establiĝi en la menciitaj fakoj. La angla lingvo do enpenetris ankaŭ en Svislando la plimulton de la branĉoj: ekonomio, industrio, labormerkato, edukado, esplorado, scienco, politiko, administrado, armeo, diplomatio, sporto, turismo, amaskomunikiloj, varbado, marketingo, interreto kaj distrado. La pensmaniero cele al la akiro de pli grada prestiĝo ŝajne estas grava kialo por la utiligo de la angla lingvo. Posedi la anglan signifas multajn avantaĝojn, ĝia malposedo signifas malavantaĝojn kiel pli malaltajn salajrojn, eĉ perdon de la laborloko. Unu el la esencaj

⁴ Kiuj evidentigis multajn mankojn kaj defecitojn ĉe la bazaj konoj de la lernantoj.

argumentoj favore al la angla koncernas ankaŭ la ŝparadon de mono. Sekve, sen kono de la angla lingvo multo ne estas imagebla, pro tio kursoj de la angla lingvo fariĝis neeviteblaj kaj devigaj por ĉiuj.

Ĉu la angla estas danĝera por la naciaj kulturoj ?

Ŝajnas, ke la akcepto de la angla lingvo ĉie kreskas, kvankam ankoraŭ longe ne ĉiuj bone scipovas la anglan lingvon; precipe pli maljunaj homoj havas problemojn kun ĝi. Multaj kontraŭuloj de la angla lingvo timas, ke la angla lingvo povus iam fariĝi ĉefa lingvo kaj vidas la scenaron, ke ĝi povus eĉ fariĝi nacia lingvo de Svislando, almenaŭ funkcie inter la unuopaj landopartoj. En iliaj okuloj la angla lingvo do ŝajnas esti danĝero por la svisa(j) nacia(j) kulturo(j). Certe okazas, ke inter homoj, kiuj ne sufiĉe konas la lingvon de la aliaj, ekzemple germanlingvanoj kaj franclingvanoj, preferas uzi la anglan kiel ‚lingua franca‘. Se tiu evoluo daŭros, povos okazi, ke la angla lingvo povus ŝanĝi sian statuson de fremdlingvo kaj fariĝi dua lingvo. Sed eble la timoj ja estas troigitaj kaj nepravigitaj. Laŭ iu esploro estis malkovrite, ke la angla lingvo ne sukcesis en Svislando forpuŝi la francan lingvon en ties funkcio kiel ekonomia kaj laborlingvo. Do, la angla lingvo ne estas utiligata, ĉar la homoj aparte ŝatas ĝin (ekzemple pro ĝia belsoneco), sed pro ĝia oportuneco kaj ĉar la demando pri alternativo ne ekzistas.

Specifaj konsideroj

Rande de la debato estis starigitaj pluraj demandoj al la adreso de la politiko, inter kiuj la plej interesaj: Ĉu estas bone, se la zurika kantono agas propraŭtoritate, t.e. sen koordinado kun la ceteraj kantonoj ? Ĉu kiel unua fremdlingvo estu instruata la angla aŭ la franca ? Ĉu la frua instruado de fremdlingvoj efektive influas la fremdlingvan kompetentecon de infanoj kaj ĉu ĝi kondukas al pli altgrada sentemo pri fremdlingvoj ĝenerale aŭ ĉu antaŭjuĝoj fortikiĝas ? Ĉu la instruado de la angla lingvo restos alloga, se ĝi estos devige enkondukita ? Ĉu la angla lingvo restos alloga, se ĝiaj konoj fariĝos ĝeneralaj kaj memkompreneblaj kaj kiam tiu lingvo fariĝos ĉies posedo ? Ĉu la frua instruado de la angla lingvo estas bona kaj ĉu naŭ jaroj da instruado de la angla lingvo estas pli efikaj ol nur sep ? Kiuj ŝtatpolitikaj sekvoj estos kaŭzataj, se montriĝos, ke la lernantoj scipovas la anglan pli bone ol la francan lingvon ? Iu kontribuanto diris, ke la sinsekvo de la instruado de fremdlingvoj ne gravus, sed gravus la maniero kaj formo de la instruado kaj la propedeŭtika valoro de iu lingvo. Alia opiniis, ke la demandoj pri la emo (motivacio) kaj kapablo lerni fremdlingvojn devus esti metitaj en la centro de la atento.

La angla kiel ‚neŭtrala‘ lingvo ?

Malgraŭ duboj kaj emociaj elpaŝoj kaj debatoj en la svisa parlamento pri la rolo de la angla lingvo kaj ĝiaj sekvoj, la oficiala politiko finfine reagis pragmate. Post kiam antaŭ jaroj la svisa registaro ankoraŭ taksis la anglan lingvon danĝera por la kultura plureco de la lando, ĝi nun opiniis, ke la situacion kun la angla lingvo oni ne dramigu kaj oni ne

kaŭzu principajn barojn al la angla kiel globala komunikada lingvo. La svisa konstitucio disponigas sufiĉe da rimedoj por protekti la naciajn lingvojn, kaj la tasko de la registaro konsistas en la konsiderado kaj aplikado de taŭgaj rimedoj por konservi kaj akceli la lingvan kompetentecon en la diversaj naciaj lingvoj.

Tamen, diversaj politikistoj restis skeptikaj kaj reprezentis la opinion, ke la forpuŝado de la naciaj lingvoj favore al la angla lingvo povus havi aŭ nepre havos malavantaĝan efikon por la interkultura interkompreniĝo en Svislando. Malgraŭ tio, oni devus fronti la defiojn kun aperteco, ĉar finfine oni ja ne celas malhelpi al la civitanoj ties liberan aliron al la informoj kaj merkatoj de la mondo, kiu pli kaj pli okazas pere de la angla lingvo.

En la administracia aparato de la svisa konfederacio, kie ĉiu kunlaboranto havas la rajton uzi sian propran nacian lingvon (en la praktiko la germana kaj franca lingvoj restas la decidaj lingvoj, dum la itala kaj retoromanĉa ŝajne ekzistas pli malpli formale aŭ simbole). Fakte ekzistas la opinio, kiu diras, ke la angla lingvo povus servi kiel ‚neŭtrala‘ lingvo ankaŭ en la oficiale kvarlingva administracio de la svisa konfederacio. Nature kie la svisa administracio havas internaciajn rilatojn kiel en la diplomatio, ekstera komerco kaj armeo, la angla lingvo ne estas tabuo.

La angla kiel ‚lingua franca‘ ?

Do, eĉ se la angla lingvo en la proksima estonto havas neniujn ŝancojn fariĝi sola oficiala lingvo de Eŭropo aŭ Svislando, ĝi atingis la statuson kiel ‚lingua franca‘ de la eŭropa ĉiutago, kiun ankaŭ Svislando partoprenas (kvankam ĝi ne apartenas al EU, sed kun ĝi tamen estas forte interligita pere de multaj duflankaj kontraktoj). Sed kiel konate, Eŭropa Unio favoras la multlingvismon, kaj same en Svislando multaj politikistoj apogas la alproksimiĝon al la eŭropa procezo ankaŭ rilate la lingvopolitikon (vd. sube). Malgraŭ tio Svislando restis en dilemo rilate la demandon ĉu Svislando flegu unuavice la nacian koheron inter la regionoj, kulturoj kaj lingvoj, aŭ ĉu ĝi donu la preferon al la globala merkato – aŭ ĉu ĝi konsideru ambaŭ samtempe ? Do, la angla lingvo fariĝos ekzameno por la multlingveco. Multaj fakuloj timas, ke la progreso la angla lingvo povus redukti la signifon de la franca kaj germana lingvoj. Tamen, en Svislando la identiĝo kun la propra lingvoregiono estas daŭre treege forta, tiel ke oni povus paroli pri unuopaj ‚lingvaj blokoj‘. Samtempe, en Svislando regas vasta interkonsento pri tio, ke la angla lingvo ne fariĝu konkurenco por la naciaj lingvoj, sed ke ĝi povu ricevi maksimume konkrete utilajn niĉojn kaj adekvate specifajn funkciojn. Malmultaj homoj do pledas por la angla lingvo kiel ‚lingua franca‘ de Svislando. Tamen, la timo restas, ke la angla lingvo povus kaŭzi disdividon de la socio en du klasoj – unu kiu regas kaj sukcese aplikas la anglan, kaj la alia, kiu devas vivi sen tio. En la scienco precipe la socilingvisto observas per empiriaj esploroj eblajn sekvojn de la vasta uzado de la angla lingvo. Unu el tiuj esplortemoj koncernas ekzemple la hipotezon pri la influoj de la anglalingva kulturo (aŭ ‚mentaleco‘) ĉe la aplikantoj de la angla lingvo, ekzemple en firmaoj kaj institucioj.

Do, tio estas la stato de la ĝisnuna diskuto. Sed en pluraj kantonj oni konkrete agis.

Gvidlinoj por nova lingvopolitiko en Svislando

Laŭ Regine Aeppli, socialdemokrata membro de la registaro de la kantono Zuriko⁵ emfazis en prelego de 2008 pri lingvopolitiko de Zuriko kaj Svislando, ke la ĝisnuna unuflankeca diskuto pri la demando pri kiu fremdlingvo estu instruata kiel unua en la lernejoj, ne havas sencon. Male, ŝi opiniis, ke la reciproka konkurencigo de la koncepto de la ‚ekonomia neceso‘ kontraŭ la koncepto de la ‚nacia kohero‘ estas falsa kaj ekza, ĉar pluraj sociaj kaj politikaj evoluoj kiel la libera persona trafiko en Eŭropo, kiuj same por Svislando estas nova realeco, kondiĉigas novan realisman percepton de la aferoj, al kiuj necesas adekvate reagi. Rilate la lingvan demandon, Aeppli do pledis por tuteca lingvoinstruada koncepto kaj tiucele referencis al la t.n. eŭropa lingvoportfolio,⁶ kiu laŭ ŝi montras la ĝustan vojon. La du esencaj celoj de la eŭropa lingvoportfolio estas multlingveco unuflanke kaj frua lingvolernado aliflanke; aldoniĝas la libera movebleco en Eŭropo, la konservado kaj fortigo de la kultura plureco, la akcelo de la aŭtonoma lernado kaj de la dumviva lernado. Interkulturaj komunik-kompetencoj fariĝas en internacia ĉirkaŭaĵo, en kiu la eŭropanoj moviĝas, kaj en ekonomia sistemo, kiu devus esti efika kaj konkurenckapabla, pli kaj pli gravaj. La celo de tiu tuteca fremdlingvoinstruada koncepto estus ne doni prioritaton al unu el la fremdlingvoj, sed el klerigpolitika vidpunkto atingi, ke en la fremdlingva instruado ambaŭ fremdlingvoj, do ekzemple la angla kaj franca, la lernantoj akiru la saman kompetentecon. El tio sekvas la preferindo, ke la instruado de tiuj lingvoj okazu jam en la primara (baza, elementa) lernejo. En tiu koncepto Aeppli vidas ankaŭ la premison por paca kunvivado en Eŭropo; kiu lernas fremdajn lingvojn, tiu estas kuraĝigita malfermi sin vidalvide de aliaj homoj kaj evoluigas komprenon por aliaj kulturoj kaj vidpunktoj – alivorte – tiu homo fariĝas interkulture kompetenta. Konkrete, la agadplano 2004-6 de la Eŭropa Komisiono, kiu estis decidita la 24an de julio 2003, antaŭvidas, ke ĉiuj eŭropanoj krom bona kono de sia gepatra lingvo lernu minimume du aliajn fremdlingvojn. Tiu lernado komenciĝu en la frua infanaĝo. En tiu agadplano estas notite, ke la lernado de fremdlingvoj plibonigas la ĝeneralajn kognajn kapablojn, fortigas la komprenon de la propra gepatra lingvo, plibonigas lego- kaj skribokapablojn kaj evoluigas la ĝeneralajn komunikkapablojn. En la tuta diskuto pri tiu agadplano cetere la argumento, *ke la angla lingvo kiel komuna ‚lingua franca‘ ne sufiĉas, trovis vastan interkonsenton*. Samtempe, oni emfazas, ke la fremdlingva instruado (ekzemple de la franca) profitas de la frua instruado de la angla, alivorte: la angla lingvo pozitive influas, propedeŭtike, kiel motivaciilo, la lernadon de fremdlingvo. Cetere, ĉi tiu svisa lingvopolitiko antaŭvidas, ke la loka standarda lingvo (kiel la germana aŭ franca) devas okupi la unuan lokon. En Svislando la tutan lingvosituacion komplikas la germanlingvaj dialektoj, kiuj estas tre popularaj kaj kies uzado en la lernejoj draste kreskis lastatempe.

Lingvopolitika kompromiso

Surbaze de ĉiuj tiuj debatoj kaj komplikajoj de la realeco, la tutsvisa lingvopolitika strategio rilate al la instruado de fremdlingvoj en la lernejo baziĝas sur kompromiso

⁵ En 2009/10 ŝi prezidas tiun registaron.

⁶ <http://www.sprachenportfolio.ch>

farita la 4an de marto 2004. Laŭ tiu kompromiso la unua fremdlingvo estu enkondukita plej malfrue en la tria klaso kaj la dua fremdlingvo plej malfrue en la kvina klaso de la primara lernejo, kaj minimume unu el ili devas esti nacia lingvo de Svislando.⁷ La kantonoj do povas mem decidi kiun lingvon ili unue kaj kiun ili poste instruigu.

La procezo kulminiĝis kaj oficialiĝis en la t.n. HarmoS-konkordato, kies celo estas harmoniigi (kaj standardigi aŭ normigi) la 9 devigajn lernejojarojn. La konkordato inkluzivas ankaŭ la fruan fremdlingvan instruadon. Ĉi tiu HarmoS-konkordato estis unuvoĉe akceptita de la plenkunsido de la Svisa Konferenco de la edukdirektoroj la 14an de junio 2007 kaj ekvalidis la 1an de aŭgusto 2009 post kiam ĝi estis ratifita far dek kantonoj kadre de la regula aliĝproceduro.⁸

La situacio aspektas laŭ regionoj do jene (tri modeloj):

- a) Angla lingvo ekde la 3a kaj franca lingvo ekde la 5a klaso: en la grandparto de la germanlingvaj kantonoj (ZH, AG, SH, TG, SG, AR, AI, GL, SZ, UR, NW, OW, LU, ZG)
- b) Franca lingvo ekde la 3a kaj angla lingvo ekde la 5a klaso en la kantonoj BS, BL, SO, BE, germanlingva FR, GR, TI (ĉi tie franca 3, germana 7, angla 8).
- c) Germana lingvo ekde la 3a kaj angla lingvo ekde la 5a klaso en la romandaj kantonoj JU, NE, VD, GE, franclingvaj BE, FR kaj VS.⁹

Estis ankaŭ substrekte, ke la instruado de la angla lingvo en tiu ĉi frua stadio estas didaktika defio. Por garantii kvalitan fremdlingvan instruadon gravas posedi kompetentajn instruistojn, adapti la instrumanierojn al la koncernaj aĝoj de la lernantoj, utiligi taŭgajn lernilojn. En tio gravas, ke oni observu la evoluon de la fremdlingva instruado kaj surbaze de novaj kognoj adaptu sin daŭre al la realo. En tio gravas ankaŭ la regula interŝanĝo inter lernejoj inter la germanlingva kaj franclingva parto de Svislando. Regine Aeppli konsideras, ke fiaskon de tiu lingvopolitiko oni ne povus al si permesi kaj ĝi estus fatala.¹⁰

⁷ Vd. <http://www.edk.ch/dyn/12926.php>

⁸ Vd. <http://www.edk.ch/dyn/14901.php>. Ĝis la 27a de septembro 2009 aliĝis jenaj kantonoj, kie HarmoS estis akceptita: Schaffhausen (2007), Glarus, Vaud, Jura, Neuchâtel, Valais, St. Gallen, Zürich, Genève (2008), Tiĉino, Bern, Fribourg (kun referendumo). Ankaŭ Argovio decidis en junio 2007, ke la angla lingvo estu enkondukita en la tria klaso de la primara lernejo ekde la lernejo 2008/09 (ekzemplo por kostoj: kiel jaran krediton por tiu enkonduko Argovio antaŭvidas la sumon de 10,37 milionoj da svisaj frankoj). HarmoS estis rifuzita eksplicite en la kantonoj Luzern, Grizono, Thurgau, Nidwalden, Uri, Zug (Svislando havas 26 kantonojn). jLa kontraŭuloj de HarmoS (t.e. tiuj kiuj estas kontraŭ la harmoniigo de la 9 devigaj lernejoj) prezentas sin sur <http://www.nein-zu-harmos.ch>. La fruan fremdlingvan instruadon oni ne apogas, ĉar oni opinias, ke la efiko ne estas certa, ke la sinsekvo de fremdlingvoj ne estas difinita, ke la nivelo de la instruado de la germana lingvo povus esti neglektata.

⁹ Mapon vd. sub http://www.ag.ch/nwedk/shared/dokumente/pdf/karte_d.pdf

¹⁰ La germanlingva teksto de la prelego de Regine Aeppli estas trovebla sur ŝia retpaĝo http://www.reginaeappli.ch/Portals/0/_referate/10_ZeigemaesseSprachenpolitik.pdf